

# ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo. Esperantista (I.K.U.E.), fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj Akministracio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht), Nederlando

Kunlaborantoj: d-ro E. J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo) Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo.) J. Vernoux, sac. (Francujo.) Eusebio Maynar (Hispanujo), Prof. H. G. Wannemakers S. J. (Indonezio), G. Ellerman kaj d-ro W. J. A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono.).

## KION NI PUBLIKIGU EN ESPERANTO?

**L**astempe ni ricevis kelkajn instigojn ĉirilate. Kaj el la pensoj de la skribantoj montriĝis menso, pri kiu ŝajnas al mi inde ion diri. Ne publikigu kion oni facile povas legi en sia nacia lingvo, ĉu libron ĉu artikolon. Kaj se vi publikigos ion prefere elektu la vivojn de sanktuloj, la biblion, ktp. Laŭ mi tiu menso estas tre danĝera por nia movado. Se ni ne publikigos, kion oni povas legi en nacia lingvo, certe ni povas halti la tutan esperanto-movadon, escepte la uzadon de Esperanto en la trafiko, ĉu turisma ĉu komerca, kaj en buŝa kontakto. La motivo ankaŭ certe validas por la verkoj pri la vivo de sanktuloj, ktp. Do tute ne necesas ion publikigi pri ili. Tamen ĉiu kiu havas pli intimajn rilatojn kun la Esperanto-movado scias, ke la eldono de gravaj verkoj ofte servas al la fiereco de la esperantistoj pli ol al la vera ekkono de la valoro de la verko. Multaj libroj nur ornamas la ŝrankon. Laŭ mi la menso estas danĝera, ne nur por la esperanto-movado, sed por la tuta vivo. Estas malmoderna vidpunkto, ke oni nur vivas por post la vivo esti feliĉa en la ĉielo, laŭdanta Dion. Oni forgesas ke ni devas servi al la ĉiambona Dio ankaŭ kaj ĝismorte dum la tera vivo. Kaj por plenumi tiun taskon iom da bonstato en materia senco estas necesa. La ĉielo ne estas rekompenco por mizera vivstato surtera. Ni devas atenti tri aferojn; la fizika kaj materia vivo, la servo surtera de Dio, kaj la eterna vivo en la ĉielo. Se la unua ne estas en ordo, ekzistas grava ŝanco ke la dua ne fartas bone kaj la tria nur estos granda risko. Ni preferas pli alian sugeston, ke ni pli skribu pri la sociaj problemoj. Estas bona sugesto, sed oni forgesis aldoni iom da realigo. La problemoj estas multaj kaj diversaj. La socia problemo estas por unu la domo, por alia laboro por tiu la salajro, por tiu ĉi la vivrimedoj, ktp, ktp. Mallonge oni povas konstati ke la deziroj de la havenlaboristoj en Rotterdamo estas la samaj deziroj de la milionuloj en Pakistano. Ĉi tiu flanko de la publikigado estas tre malfacila kaj tre respondeca. Tamen se iu ensendas taŭgan artikolon, ni kun ĝojo aperigos ĝin. La aferoj havas nian grandan atenton.

• • •

**RAPORTO PRI LA II-a EŬKARISTIA ES-  
PERANTO MONDKUNVENO BARCELONA  
1952**



**Merkredo, 28 Majo.**

Antaŭ la deka matene multnombro da esperantistoj estis kunvenintaj ĉe la pordo de la Preĝejo de la Dominikanaj Monaĥoj (Ausias March 54), kondukita de nia kara prezidanto pastro A. Beckers.

Je la deka alvenis lia ĉefepiskopa moŝto el Nankingo, Monsinjoro Yu-Pin, kiu estis ricevita kun grandaj aplaŭdoj de la amaso da ĉeestantoj.

En granda procesio la esperantistaro eniris la preĝejon kaj komenciĝis la Sankta Meso, kiun diris Mons-ro Yu-Pin dum ke Kroacia pastro arte ludis sur la orgeno. Kun granda espero kaj ĝojo la kantoj dissonis en la Dia servo.

Nia prezidanto faris la spiritan paroladon.

Post la fino de la Meso, la ĉeestantoj atendis por adiaŭi tutkore Monsinjonon Yu-Pin

Poste en la granda salono de la monaĥejo (Bailen 10) okazis la interkonatiĝa kunveno. Pli ol 70 samkredanoj ĉeestis, el kiuj la plimulto estis hispanoj, kompreneble. Inter la eksterlandanoj ni rimarkis: s-ron Wyat kaj Saunders el Anglujo; s-ro

Cornelissen el Nederlando; s-inon Jung el Germanujo. s-ron Thollet kaj familion el Maroko, s-inon Perez el Argentino, pastro Arrigo el Italujo, kaj aliajn.

**Ĵaŭdo, 29 Majo.**

Okazis la unua laborkunsido. Pastro Beckers malfermas la kunvenon per la kristana saluto. Prezidos la kunsidojn d-ro De La Puente, prezidanto de la Katolika Esperantista Hispana Asocio, Li afable bonvensalutas la ĉeestantojn, kaj deziras ke ilia ĉeesto estos poste inda memoro. Li parolas pri la nuntempa situacio de la katolika esperantistaro en Hispanujo.

Poste transdonis la parolon al diversaj reprezentantoj.

Pastro Beckers el Belgujo, salutis nome de la IKUE-estraro kaj nome de la Flandraj katolikaj esperantistoj. Li pritraktas la situacion de E.K. kaj klarigas kial ĝi dum unu jaro ne povis elveni.

s-ro Saunders el Anglujo parolis pri la malfacilaĵoj de la disvastigo de Esperanto ĉe la anglaj katolikaj pastroj.

s-ro Cornelissen el Nederlando: Pri instruado de Esperanto en la Elementaj Lernejoj.

s-ino Jung nome de ŝia frato, la redaktoro de Heroldo kaj de la samlandaj samideanoj.

s-ino Casasnovas el Zaragoza (Hispanujo) pri la laboro de K.E.H.A. en la kadro de la Hispana Katolika Agado.

Pastro Casanovas el Gerona (Hispanujo) pri la mortita pastro Font Giralt, granda esperantisto el Katalunujo, kaj iama prezidanto de I.K.U.E.

s-ro de la Torre el Cordoba pri la problemoj de Esperanto en la lernejo.

s-ro Chaler el Tarasa pri la esperantista vivo en tiu urbo.

Pastro Arrigo el Italujo salutis la kunvenon nome de pastro Carolfi (granda aplaŭdo) kaj nome de la italaj samideanoj.

s-ro Hernandez kiel reprezentanto de la pionira grupo el la Kooperativo Mantekista de Gracia.

Fraŭlo Muns (la plej juna el la kongresistoj-15 jaraĝa) pri la Katolika Esperantista Junularo en la Katolika Junularo Tutmonda.

Poste pastro Beckers diris sian unuan lecionon pri la Paco, la EŬkaristio kaj la Mondpaco.

Envenis leteroj de: s-ro Minnaja el Romo; s-ro Perez el Valencio; s-ro Bulter el Nederlando; s-ro Ruggiero el Romo, Katolika Grupo el Hannover;

Pastro v. Hoogstraaten el Belgujo; Delegito de U. E. A., el Taragona; s-ro Rozas, Infanterio Kolonelo el Taragona; s-ro Mudrak el Vieno.

**Konkludo:** Ne estas necese la eldonado de Katolika Biblio en Esperanto, sed jes granda disvastigo de katolikaj preĝlibroj. Oni instigas al multnombra abonado al Espero Katolika por plej efektive helpi al la Katolika Esperanto Movado. Poste la Kongresa Estraro vizitis la paroĥan preĝejon de S-ta Johano Baptanto en Gracia, en kiu paroĥo estis la unua hispana esperanto-grupo.

**Vendredo 30 Majo.**

Post la kristana saluto parolis s-ro Thollet el Maroko pri la disvastigo de Esperanto en la Katolikaj rondoj.

s-ro Anglada, delegito de H. E. F. pri: Klarigo de la nuna stato de la movado en la katolikaj hispanaj rondoj.

Pastro Beckers legis la telegramon, sendita al la Papo, kaj memoris ke en Budapest la esperantistaro ricevis respondtelegramon de la Sankta Seĝo.

s-ro Gomez el Barcelona (Blindulo) pri Esperanto kaj la blinduloj.

s-ro Saunders el Londono pri la riskoj de la katolikaj esperantistoj en la neŭtralaj rondoj.

Pastro Beckers parolis pri la pasinta kongreso kaj kunveno de IKUE, pri la vizito al la Papo en 1950 kaj pri la Katolika Esperanto Movado. Poste li donas sian duan lecionon pri la S-ta Eŭkaristio. Envenis leteroj de: Katolika Esperanto Asocio el Aŭstrujo; Radio Roma; Lia Generala Moŝto de la Karmelitana Ordeno.

**Konkludoj;** Provizora starigado de K. E. H. A. kiel landa ligo de IKUE. Programoj pri la disvastigo de Esperanto en katolikaj medioj, speciale en la seminarioj. Post la ĵa. laborkunsido la kongresa estraro vizitis lian ĉefepiskopan Moŝton Monsinjoron Yu-Pin, honorinda protektanto de la Esperantista Katolikaro.

**Sabato 31 Majo.**

Dankmeso kun parolado de pastro Casanovas el Gerona.

**Lundo 2 Junio**

Forveturo al Manresa, vizito al la Sankta Groto de S-ta Ignaco, s-ta meso kaj prediko de pastro Beckers.

Poste vizito al la katedralo, muzeo kaj lasta kunsido en la salono de la urbdomo.

Parolis s-ro Chaler, kiu dankis la ĉeestantojn pro ilia bona laboro.

S-ro Saunders gratulas sin pro tio ke li estis veninta al Hispanujo.

s-ro Jung, dankas la partoprenantojn pro ilia ĉeesto.

Pastro Beckers parolas lastfoje pri IKUE kaj IKI; gratulas s-inon Jung kaj f-inon Lonch pro la sukceso kaŭze de ilia altvalora kaj senlaciĝa organizaj laboroj por la kongreso. Li fermas la kunsidojn kaj la kongreson.

Poste forveturo al Taraso, vizito de la romanikaj preĝejoj kaj la muzeo kaj por interkonatiĝo kun la tarasaj samideanoj.



---

## ADMINISTRACIAJ KOMUNIKOJ

Estas jam de longe kutimo ke 'Espero Katolika' ne elvenas en la monato Aŭgusto. Tial ĉi tiu numero aperas je la mezo de Julio, kaj en iom pli ampleksa formo. La venonta numero elvenos je 1 Septembro proksima.

Ni devas atentigi vin ke la oficejo estas fermata de 16 Julio ĝis 16 Aŭgusto pro libertempa foresto de la sekretario. Do leteroj en tiu tempo ne estos respondataj kaj mendoj de libroj ne ekspedataj. Post tiu tempo ni denove servos al vi kaj al viaj interesoj.

---

L. G. C. De Jong, sekr. -o.

## LA EŬROPA MOVADO KAJ LA LINGVO

En 'De Standaard' (katolika ĵurnalo de Belgujo) de 3 Junio 1952 aperis artikolo verkita de nia prezidanto sac. A. Beckers. La enhavo ŝajnas al ni tiom interesa, ke ni donos al vi la kompletan tradukon.

De post Decembro 1951 oni ege klopodas tra la tuta Eŭropo por konigi al la homoj, kielgrade oni jam progresis en la realigo de la unuigo de Eŭropo. La plano Schuman por karbo kaj ŝtalo, la plano Pleven por la eŭropa defendkomuno, la plano Bonafous por la internacia eŭropa trafiko sur la vojoj, la plano por la kunvoko de konstituanta kunveno por la Eŭropa Federacio, kaj je la 9a de Oktobro venonta la Eŭropa Akademio en Brugge malfermos sian trian studjaron.

Kiam oni pensos pri la priparolado de eŭropa lingvoplano?

La internacialingvoplano? Ĝi devus esti lokata en la kadro de la plano Bonafous. Ĉar ĉi tiu plano, kiu reguligos la komunan intereŭropan vojtrafikon, malgrandigos la distancojn kaj la jam malgrandan Eŭropon oni trakuros en minimuma tempo de unu angulo al alia.

Kaj tamen tiu lingvoplano jam ekzistas dum multaj jaroj, antaŭ ol naskiĝis la ideo de 'Eŭropo Unu'. Tiu plano de internacia helplingvo jam estas realigata. Ĉia klopodo, kiu celas ekstermi la limojn inter la homoj, trovas elkoran akcepton ĉe la moderna pensanta homo. Tamen la lingvo ludas gravan rolon en tiu materio. Ni ne devas forgesi ke, por realigi tiun unuigon kaj kompletan kaj por fari fratojn el ĉiuj homoj, estas necese ke ili sin komprenas reciproke. Tio ne estas nur vero por la gvidantaj personoj sed ankaŭ por ĉiu simpla membro de la socio, kia malgranda li estu. Ne estas imageble ke la socio disvolvas sian kompletan riĉecon sen la kunlaboro de ĉiu membro. Kaj la diverseco en la rasoj, en la kulturo kaj en la opinioj necesigas la interparoladon. Sed tio supozigas ke tiuj diversaj rasoj, grupoj, kun siaj diversaj lingvoj interkomprenas unu la alian. Ni devas konstati ke estas ankoraŭ longa vojo al tiu realigo. Ni ne celas ke diversaj popoloj devas oferi sian nacian lingvon profite al alia lingvo. Ni devas konservi la nacian lingvon, ĝi estas sankta heredaĵo. Por konservi la egalrajton inter la popoloj ne estas eble akcepti unu nacian lingvon kiel internacian lingvon. Certe tio estos fonto de malkonsento kaj de malamikeco. Kaj cetere kiam nacian lingvon oni elektos, ĝi estos tro malfacila por ke fremduloj konu ĝin perfekte; kaj tio devus esti ebla por la interkompreniĝo.

La dua lingvo, por ĉiu persono kiu pensas eŭrope aŭ monde, devas esti artefika lingvo, simpla, facile lernebla en mallonga tempo kaj tamen sufiĉe fleksebla, ekzakta kaj belsona. Ĉu tio estas la realigo de la antaŭvido de

R.H. Benson en lia romano 'La Dio de la Tero', en kiu la dua lingvo de ĉiuj eŭropaj nacioj, eĉ de ĉiuj popoloj de la mondo, estas Esperanto?

Por pruvi la ĉiam kreskantan intereson por ĉi tiu mondlingvo, kiu demonstraciis sian aplikeblon en 36 internaciaj kongresoj, ni donu kelkajn citaĵojn el gravaj revuoj.

En 'Katholiek Cultureel Tijdschrift 'Streven' (1950 jk. 4 p. I 314-316) prof-o Geurtsen S.J. raportas pri la Internacia Thomisma Kongreso en Romo.

Li konstatas la fakton ke kvardeko da parolantoj por multaj personoj ne estis kompreneblaj, ĉar ili uzis hispanan aŭ italan lingvon. Kvankam la latina lingvo estus sufiĉa por la partoprenantoj de ĉi tiu kongreso, tamen ĝi estus barilo por disvastigi la rezultojn ekster la kongreson, kaj certe Esperanto povas doni eblecojn en la estonto.

Similan ateston ni trovas en la sama revuo (1950, jk. 4 p. I 200-203) en kiu prof-o Dierickx S.J. raportas pri la 9a Internacia Kongreso de Historiaj Sciencoj en Parizo. Li detale priskribas la lingvoproblemon.

Ĉiuj partoprenantoj estis tuŝataj de la lingvoproblemo. Estis dolorige aŭdi kiel mallerte kaj balbutante famaj historiistoj sin esprimis en fremda lingvo. Tia sperto al ĉiu klarigas la dezirindecon alpreni unu interlingvon, kiun ĉiuj sufiĉe praktike uzu.

Estus vere dezirinde ke la preparantaj komitatoj por internaciaj kongresoj serĉus kunlaboron kun la asocioj de sciencaj esperantistoj por esplori la eblecon de praktika uzado de Esperanto.

Patro Lorson ankoraŭ pli profunde esploras la problemon en 'Etudes' (1950 T. 267) en la artikolo: 'Dulingveco en la lernejoj de Elzaso'.

'Se oni volas realigi la unuigon de la Okcidento kun la restanta mondo, tiam necesas ilo por ligi la popolojn. Internacia helplingvo estas necesa krom la naciaj lingvoj, kies forigo ne estu temo de diskuto'.

En la revuo 'America' (1950 vol. 83) J. Lafarge S.J. citas la sekvantajn vortojn de Lia Papa Moŝto Pio XII al la 21a Pax-Romana-Kongreso: 'La urĝeco de la homaj problemoj, kiuj sin prezentas al nia generacio, devigas ĉiujn sincerajn kaj seriozajn personojn al komuna fortostreĉo en stato de reciproka interkompreniĝo'.

Ankaŭ dum 22a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Romo dum la Sankta Jaro 1950, la Papo Pio XII parolis kuragiĝantajn vortojn pri la dezirindeco kaj la aplikado de Esperanto al la prezidanto de tiu Internacia Unuiĝo.

La pruvo de la lingvo estas ĝia praktika aplikado.

Esperanto sukcese trapasis tiun ekzamenon. Kial ni prokrastus la aplikadon ankoraŭ pli longe?

En la tempo, ke la honestaj homoj de ĉiuj popoloj devas kune labori, batali densi kaj preĝi, ni, ne povas senefike forlasi la uzadon de tia forta rimedo Ni ne povas kontraŭstari la enkondukon en nia tempo!

A. Beckers, sac.

## 'LA BALADO PRI BERNADETTE' DE FRANZ WERFEL

### El la ĉap. 38

Kiel plej malfidema kontraŭulo nun venkiĝis la episkopo de Tarbes. Li klinas sin sub la kvin antagonismoj, kiuj estas en la grandaj sanigoj per la fonto Massabielle kaj kiujn laŭ la konfeso de la naturscienca anaro de l' esplorkomisiono plu homa racio ne kapablas komprenigi.

Ili estas:

La unua antanganismo inter la malgraveco de la kuracilo kaj de la grandiozeco de la sukceso.

La dua antanganismo inter la sama kuracilo kaj la diversaj malsanoj per ĝi forigitaj.

La tria antagonismo inter la mallonga apliko de la kuracilo kaj la antaŭa longdaŭra uzado de la kuraciloj rekomenditaj de la medicina scienco.

La kvara antagonismo inter la tuja efiko de l'unu kuracilo kaj la ofte dumjara sensukceseco de l'aliaj.

Kaj fine la kvina antagonismo inter la daŭrema karaktero de l'esploritaj malsanaĵoj kaj ilia subita forigo per la kuracilo.

Ĉi tiujn antagonismojn nur povas jam kontesti mensoj, kiuj konscie kaj intence fermas sin antaŭ la dokumentitaj faktoj kaj konsideras malhonestaj propagandistoj de kredo al mirakloj tiel malsanulojn kiel kuracistojn.

Trad. Dr. Adolf Haldbedl

\* \* \*



En la mezepoko Flandrujo apartenis al Francujo kiel feodala ŝtato. Tamen la komercistoj de teksaĵoj en Gent, Brugge kaj Yperen ĉiam sciis konservi sufiĉe grandan memstarecon. Filipo la Belulo kun siaj leĝistoj volis ĝin preni kiel provinco de sia regno. Sekvita de la nobelaro kaj la urbaj magistratoj, kiuj ambaŭ estis tute francigitaj kaj kontraŭstaris la grafan potencon, la grafan potencon, la francaj reĝaj oficistoj enpenetris ĉien. De la pli granda parto de la kasteloj kaj de la urbdomoj flirts la franca liliflago. Kontraŭe de la partio de Lilianoj sin erektis la potencaj gildoj de la teksistoj al kiuj la Grafo Guy de Dampierre sin ligis.

Pro la flandra baniero kun la leono ili ricevis la nomon de 'ungeguloj'. Kiam Filipo sin preparis okupacii perforte Flandrujon, la grafo envokis la helpon de Eduardo I de Anglujo, la liveranto de la lano por la flandraj teksiloj. Filipo konkeris la sudan parton de Flandrujo, Eduardo I albordiĝis en Sluis. Minacis la ripeto de longedaŭraj bataloj kaj militoj inter Francujo kaj Anglujo. Feliĉe la papo Bonifacio VIII atingis ke la partioj interpacigis. Tamen Guy de Dampierre ne povis partopreni la pacon, ĉar por Filipo li ne estis malamiko, sed nur ribelulo. La grafo estis kaptita kaj devis iri en la malliberejon. Reĝa guberniestro anstataŭis lin. (1300). En la sekvanta jaro la reĝo venis inspekti sian novan provincon, ĉie aplaudata de la lilianoj.

La metigildoj formangis sian furiozon. Tamen en Brugge eksplodis la malamo. La gildestroj Jan Breidel kaj Pieter Konink movigis la popolon. La malamo estis tiel forta, ke la Brugge-anoj, venis al amasmurdo.

En la nokto de la 17a de majo 1302 ĉiuj, kiuj ne povis elparoli la vortojn 'Schild en vriend' (Ŝildo kaj amiko), estis murdmortigitaj.

Parto de la francoj sciis savi la vivon, inter kiuj la guberniestro, tamen 120 personoj perdis la vivon.

Brugge ne povis plu esperi je indulgon ĉe la reĝo. La 'ungeguloj' kunvokis la popolon kun ĝiaj armiloj. Miloj kaj miloj kunvenis, kun pikiloj, stangoj kaj tranĉiloj. Ĉe Kortrijk oni atendis la alvenon de la franca vengarmeo.



La belega armeo de 10.000 nobeluloj kaj sama nombro da italaj arkpafistoj alvenis fiera kaj certa de la venko. Tamen la franca kavalerio devis halti je la muro de stangoj kaj pikoj de la flandroj. La riĉa armeo perdis la batalon kaj multaj perdis la vivon. La korpoj de miloj da nobeluloj kovris la kampon. En sako la flandroj transportis 700 parojn da oraj spronoj, pro kiuj tiu batalo ricevis sian nomon.

Tio okazis de 14an de julio 1302a.

La graflando de Flandrujo estis denove starigata.  
 Cetere la franca reĝo havis bonan impreson, ke Flandrujo ne estas feodala provinco kiel diversaj aliaj partoj de la regno.  
 Kaj kvankam Flandrujo en postaj jarcentoj devis subiri diversajn okupaciojn, en ĝi restis la memoro ke ĝi mem havas la forton kontraŭstari la usurpanton. La popolo ne franciĝis, ĝi restis flandra.  
 En la historio de la homoj estas diversaj decidaj bataloj, ekz. 312, je la Ponto Milvio en Romo. 732 Poitiers, 1571 Lepanto, ktp.ktp.  
 Ankaŭ 1302 estas tia. En tiu jaro la liberaj homoj de la urboj sciis konservi sian memstarecon kontraŭ feodala sistemo.  
 La signifo estas pli grava por tuta Eŭropo ol nur por malgranda regiono kiel Flandrujo.  
 Kompreneble la urbo Kortrijk festas la memoron. De la 5a ĝis la 14a de julio okazas grandan foiron kun ekspozicio pri la lin-industrio.  
 Samtempe okazas memorfesto kun ludoj.  
 Bedaŭrinde dum la lasta milito diversaj historiaj konstruaĵoj grave difektiĝis.  
 Tamen eble la urbo restariĝos en malnova gloro.  
 Kiu deziras esperantlingvan gvidlibreton de la urbo (kun multaj ilustraĵoj), skribu al nia kunlaboranto: s-ro Justus Merks, sekretario de la Foiro Lange Steenstraat 10, Kortrijk (Belgujo).

M.

\* \* \* \* \*



## LA 'ANGELICUM' DE MILANO.

El artikolo aperinta en 'Digesto Católico' (hispanlingva revuo eldonata en Buenos Aires) mi ĉerpis resume la jenan raporton pri intervjuo de la Kubana periodisto Mariano Errasti kun Lia Moŝto P. Zucca, fondinto de la 'Angelicum'. La nomo de pastro Zucca estas konata de eble ĉiuj ĉar en la jaro 1946 la mondaj gazetoj multe skribis pri ĉi-tiu franciskana patro kiu estis akuzita pro malaperigo de la kadavro de Mussolini. Pri tiu afero raportas la aŭtoro de la artikolo en la unua parto.

Poste li reproduktas la informojn de P. Zucca pri lia nuntempa aventuro, t.e. la 'Angelicum'.

Grandioza konstruaĵo el malhelruĝaj brikoj de Lombardio, kun modernaj linioj finiĝanta per inda serio de arkadoj, tia estas la ekstera aspekto de la 'Angelicum'.

Al la demando: en kio konsistas vere la 'Angelicum'? - P. Zucca respondas: Ĝi estas centro de alta religia kaj kultura formado, de artaj manifestacioj kaj de karita agado destinita prefere al la intelektuloj, artistoj, profesiuloj kaj studantoj. Ne temas pri Universitato, sed pli ĝuste, pri fonto de spirita radiado per konkretaj realigoj, kiel: ekspozicioj, koncertoj, distributado de filmoj k.t.p. Dum la mallonga tempo de ĝia ekzistado - oni komencis la konstruadon en la jaro 1939 - ĝi fariĝis unu el la plej gravaj centroj kulturaj de Italujo. Hodiaŭ ĝia agadradio transpasas la landlimojn, kaj oni intencas fondi en Brazilo 'Angelicum' similan al ĉi-tiu.

P. Zucca rimarkigas, ke la atingita stato ne necesis multe da propagando, ĉar la lumo - li diras - fariĝas videbla per si mem. En la albumo de vizitintoj enskribiĝis la plej elstaraj personoj de Italujo kaj kelkaj eksterlandaj. Inter la internaj instalaĵoj, la 'Angelicum' havas propran teatron kaj, situanta en ties vestiblo, amerikstilan refreŝigejon; plie propran kinejon, kiu - severe eleganta, dotita de la plej komfortaj seĝegoj de Italujo - enhavas la kinematografon plej perfektan kiun ĝis nun realigis la tekniko.

Ni konceptas la kinon - klarigas P. Zucca - kiel ilo por la spirita leviĝo. Ĉi tie ni projekcias nur filmojn de alta arta valoro.

La filmoj, elektitaj inter la plej bona produktaĵo de la mondo, estas prezentataj kun absoluta antaŭrajto, en integra eldono kaj en la originala lingvo. Ili servas ne nur al la kulturo de la publiko, sed ankaŭ kiel montrilo de la eksterlandaj plibonigoj sur ĉi tiu tereno. Krome, la 'Angelicum' distribuas filmojn al la paroĥaj centroj ktp.

Ĉu oni kulturas en la 'Angelicum' ankaŭ la muzikon?

La muziko estas nia fundamenta okupiĝo - respondas P. Zucca.

Ĝi karakteriziĝas per nia klopodo revalorigi la muzikan tradicion en tiuj sektoroj, kiuj historie kaj arte estas la plej gravaj.

Ni posedas Ĥoron kaj Orkestron zorge selektitaj kaj preparitaj.

Al ĉio kio signifas antaŭenigo ni malfermas la pordon. Do, ni ne malatentas la modernan muzikon, sed nia gvidideo estas: klasika muziko. Al ĉiuj ĝiaj formoj tra la diversaj epokoj ni donas zorgan atenton. Ni malkovris verajn valorojn kiuj estis kaŝitaj sub la polvo de la arĥivoj.

La 'Angelicum' posedas serion da manuskriptoj, per kiuj ni starigos tre originalan bibliotekon, ĉar al ĉiu ajn komponaĵo korespondis ĝia efektiva interpretado. Ankaŭ ni komencis la gravuradon de fonografaj diskoj kaj de sonoraj filmstrioj.

La moderneco de la 'Angelicum' manifestiĝas eĉ per malgrandaj detaloj; la kortoroj de la Sekretariejo kun aro da ŝkribistinoj, sliparoj kaj maŝinoj, la radiostacio kun ricevilo kaj elsendilo, la kabinoj de la artistoj k.t.p.

La ekspoziciaj galerioj kaj konferencsalonoj, la ampleksaj terasoj, ĉio spiras purecon kaj ne altrudiĝanta lukson.

Apartan komentarion meritas la 'Aula Magna' de la 'Angelicum'.

Ĉi tie okazas la konferencoj, kiuj ĝenerale temas pri la moderna kulturo, sed ili komencas etendiĝi al aliaj terenoj, kiel la juro, la medicino, ktp.

(P. Zucca citas la temon de la ĉefaj konferencoj okazintaj lastatempe rimarkigas ilian diversecon kiel ankaŭ la variadon en la elekton de aŭtoroj laŭ



ideologia karaktero).

Oni organizis semajnojn por advokatoj, kuracistoj, artistoj ktp.

La konferencoj estis plene sukcesaj.

Generale ili estas ligitaj kun publika diskutado kaj partopreno de la orkestro.

La salonoj de ekzpozicio plenumas gravan rolon. En ili okazis ekzemple la

'Sepa Foiro de Itala Arto' kaj la 'IIa Foiro de Artmetioj'.

Fine, la 'Angelicum' realigas alian agadon, nomita 'In silentio caritas' - en silento karito-, kies celo estas disdoni manĝaĵo rekte aŭ per biletoj. Oni organizas karitajn deĵortagojn favore al malriĉuloj

Nuntempe oni intencas konstrui 'Internacian domon' por artistoj kaj verkistoj falintaj en mizeron aŭ malfeliĉon, kiuj ĝemas en la plej aĉaj anguloj de niaj polipbrakaj urboj. Tiu lasta agado estas la plej kaŝita, sed por ni la plej kontentiga - opinias P. Zucca.

Rimarko de la tradukinto: Kiam mi legis la hispanan originalon de ĉi tiu artikolo, mi pensis: Jen idealisma entrepreno, kiu estas ekzemplo kaj modelo por grava centro de la Katolika Esperanto-movado, pli malpli kiel mi imagas ĝin; kaj tuj mi decidis traduki la artikolon por la legantaro de 'Espero Katolika'. La agado de la 'Angelicum' estas tiel bela kaj inda ke ĝi perfekte akordiĝas kun tiu de kultura centro de nia katolika Esperanto-movado.

Ĉu la religia kaj kultura formado, la artaj manifestacioj kaj la karito ne estas taskoj senhezite akceptindaj ankaŭ de ni?

Ĉu ni ne ŝatas artajn ekspoziciojn, muzikon, sciencajn prelegojn, filmon, teatron ktp? Kaj ni imagu Katolikan Esperanto-organizaĵon, kiu posedus propran palacon kun propraj teatro, kinejo, konferenc-salonoj, ekspoziciaj galerioj, kun ĥoro, orkestro k.t.p. Se tia centro, krom la artaj kaj sciencaj aranĝoj okupiĝos pri la diskonigado de la Esperanto-idealo per propraj biblioteko, eldonejo kaj presejo, pri instruado de la lingvo Esperanto kaj vastskala aplikado por internaciaj kunvenoj, kultura interŝanĝo kaj scienca informado, kiom da eblecoj ni havus por pli rapide progresigi la movadon!

Tiamaniere estus eĉ eble doni al unu - dek aŭ cent Esperantistoj la okazon gajni iliajn vivrimedojn per la laboro por Esperanto.

La 'Angelicum' estas organizaĵo, kiu ne nur ekzistas sed brile sukcesas.

Ĝi evidentigas ke kultura agado kaj spiritaĵo valoroj kapablas altiri la modernajn homojn kaj vekti ilian atenton ne nur en la hejm-urbo kaj-lando, sed eĉ ekster la landlimoj.

Krome ĝi estas pruvo ke grandioza idealisma entrepreno, kiu aliaĵe ŝajnas dura fantazio, estas vere realigebla.

Kiel P. Zucca movis kaj kunigis la grandajn kapitalojn necesajn por sia 'aventuro', mi ne komprenas, ĉar li, franciskana patro, sendube ne posedas propran posedaĵon.

Tamen li realigis tion kio estas kvazaŭ miraklo.

Certe oni devas esti genia, influ pova kaj eksterordinare energia homo por atingi tion kion P. Zucca faris.

Sed eble ekzistas inter la katolikaj Esperantistoj iu eminentulo kun tiaj personaj kvalitoj.

Al li mi turnas min, por li mi tradukis la artikolon. Mi kredas ke Esperanto, kiu per ĝia ideo kaj idealo estas brila lumo, bezonas lumturon, por ke ĝi estu pli bone videbla al la tuta homaro.

W. Przewolka

## MEMBROKARTO

La pagintaj membroj trovas en ĉi tiu numero sian membrokarton kaj kuponaron por la jaro 1952.

Je la dorsflanko de la karto vi povas glui vian foton kaj meti vian subskribon. Gardu la karton, ĝi devas servi dum longaj jaroj. La kuponaron vi ricevos en ĉiu jaro paginte vian kotizon.

Kune ili formas viajn dokumentojn pri I.K.U.E.

La sekretario

## KATOLIKA VIVO.



INTERNACIAJ EŬKARISTIAJ KONGRESOJ estonte nur okazos ĉiun kvaran jaron.

Tio estas pro la grandioza karaktero de la kongresoj, kaj pro la preparaj aranĝoj kiuj estas tre ampleksaj. Ĉi tion komunikis mons-ro Vachon, ĉefepiskopo de Ottawa kaj prezidanto de la Konstanta Komitato de Intern. EŬk. Kongresoj.

Lia papa moŝto jam aprobis la decidon. Ĝis nun la kongresoj okazis neregule en diversaj lokoj kaj tempoj.

La venonta kongreso do estos en 1956, sed ankoraŭ lando kaj loko ne estas fiksitaj.

LEPRULOJ estas en la mondo ± kvar milionoj. Ankoraŭ ne cent mil da ili estas flegataj en leprulejoj, kies nombro estas 219 en la tuta mondo. El tiuj hospitaloj 97 estas sub la gvidado de katolika karito. Kaj eĉ el tiuj nur 10% povas labori kun la modernaj medikamentoj. La granda malhelpo estas la malhavo de financoj.

KARDINALO FAŬHABER, ĉefepiskopo de München-Preising estis entombigata de kardinalo Frings, ĉefepiskopo de Kolonjo. La kardinalo Faŭlhaber atingis la aĝon de 83 jaroj, kaj li estis la lasta kardinalo, kiu estis kreita de la papo Benedikto XV. Li estis granda scienculo, mondfama predikanto kaj verkanto. Kun prudento kaj kurajo li kontraŭbatalis la naci-socialismon en Germanujo, pro kio li devis suferi kalumnion kaj persekuton.

Multaj el ni rememoras nian viziton al lia sidejo, katedralo kaj seminario en Preising dum nia 23a IKKE en 1951 en München.

CENTJARAJ JUBILEOJ de poŝtmarkoj ĉie en la mondo estas memorataj nuntempe. Speciale ni tamen volas atenti pri tiu de la Vatikana Ŝtato. Kun permeso de la papo elvenos speciala poŝtmarko, kiu montros la historiajn poŝtveturilojn de la Eklezia Ŝtato, tirataj de kvar ĉevaloj, trapasantaj la Ponton Milvion, historia limo de la Eterna Urbo, kie la Kruco de Kristo aperis al la roma imperiestro Konstanteno.

La FILIPINAJ INSULOJ, kiuj estis kristanigataj de la Hispanoj, trapasis tempon, en kiu la katolika vivo ne estis tre vigla. Tamen dum la lastaj 25 jaroj la katolikaro de la insulo Mindanao kreskis de kvin cent miloj ĝis du milionoj. En 1926 tie estis unu episkopo kun 25 pastroj. Nuntempe funkcias 5 episkopoj kun unu ĉefepiskopo kaj 200 pastroj. La lando tamen estas unu el la longaj vico de neprogresintaj landoj. Nuntempe oni organizas, subvenciata de la Marshall-helpo, agrariajn kursojn por pastroj, por ke tiuj transdonos sian konon al la loĝantaro.

ORIENTPASTRO-HELPO estas organizo fondita de Patro Werenfried van Straaten el Tongerlo (Belgujo) kiu kun la helpo de belgaj, nederlandaj, kaj germanaj katolikoj laboras en la diasporaj regionoj de Germanujo, kie nuntempe estas multaj refuĝintoj kun siaj pastroj el orientaj landoj. Jen kelkaj aferoj: nederlanda pastro anstataŭas orientan pastron, por ke tiu lasta en kvieta cirkulaĵo en Nederlando ripozu pro la tro streĉaj laboroj dum la lastaj jaroj; por la laboro en la diasporo oni disponas pri 14 grandaj aŭtomobiloj, kiuj estas kapelo, loĝejo por la pastro kaj magazeno por la donacoj, speciale vivrimedoj. (Generale Patro van Straaten portas la nomon de 'Lardo-pastro'.) Cetere la pastroj disponas pri motorbikloj kaj pri 120 malgrandaj aŭtomobiloj (Volkswagen). Nuntempe la patro startis sian movadon ankaŭ en Aŭstrujo. Li jam predikis en Vieno. Li klopodas ke la refuĝintoj havos iom da poŝmono, ke la zorgantaj pastroj havos iom da libertempo en Nederlando aŭ Plandrujo, ke la refuĝintoj havos domon, farmon, ktp. Cetere oni faras sciencajn esplorojn en sociologio kaj ekonomio, por ke la helpo estu pli longedaŭra. En Aŭstrujo la patro predikos ankoraŭ en Innsbruck, Klagenfurt, Graz Linz kaj Salzburg.

LA KAPUCENA-ORDENO, kiu havas 14.000 membroj, dum la lasta kanonika kunveno en Romo elektis novan 6-jaran estraron. Generalan estron estis nomata P. Benignus el Milano, kiu estas helpata de 6 konsilantoj, italo, franco, hispano, germano, jugoslavo kaj irlandano. Ni ne miras ke en la ĉefsidejo, Via Sicilia en Romo, estas centro de katolika esperanto movado!

## FAKTOJ EL LA ESPERANTO MOVADO.

Estas konate ke la Tutmonda Asocio Socikredita, same kiel la Bellamy-movado, kiuj ambaŭ propagandas ekonomian sistemon, uzas Esperanton, Per cirkulero TASK avertas kontraŭ ĉiu plano de supernacia registaro kaj potenco. Ĝi deklaras la kontraŭkomunistan defendon prudenta. Ĉu ĝi vere kredas ke unu nacio povas vivi feliĉe, kiam aliaj estas en mizero? Ke unu nacio povas kontraŭstari atakon de granda parto de la mondo? La lasta cirkulero forte impresas al ni ke ĝi mem kredas sian projekton utopia.

La Internacia Asocio Bellamy dissendis libreton pri 'Liberigo de Tio kaj Mizeraj'. Ĝi estas ankaŭ tre utopia. Cetere ĝi estas ortodokse socialista. La mondaj posedaĵoj de la eklezioj staros sub la administracio de la socio. Tio ne estas io nova. Ĉiun tagon ni povas legi la konsekvencojn de tiu regulo en niaj katolikaj ĵurnaloj, raportantaj pri la cirkonstancoj malantaŭ la 'fera kurteno'.

'The Ford Foundation' (Usono) raportis pri la klerigado de la laboristoj. Ĝi rekomendas la studadon de Esperanto.

Same kiel en du antaŭaj jaroj la Dana ŝtato subvencias arkeologian tendaron por esperantistaj studentoj. Oni daŭrigas la elfosadon de Viking-fortikaĵo en Aggersborg (Nord-Jutlando) Informoj ĉe DIS, La Universitato, Kopenhago.

La A.S. Larvik-Frederikshavnferjen el Oslo, kiu prizorgas la transporton inter Norvegujo kaj Danujo, propagandas sian entreprenon per esperantlingvaj reklamiloj.

La Germanaj Fervojoj eldonis belkoloran reklamilon en Esperanto kun informoj pri la akirado de reduktataj vojaĝtarifoj en Germanujo.

Je la 5a kaj 6a de Majo pasinta 10 geknaboj el Fredericia (Danujo) vizitis Hagron (Nederlando). Ili estis akceptataj de la policianoj. Esperanto faris tre bonajn servojn al tiu vizito.

Jenaj turistaj faldfolioj estas haveblaj: Pri la urbo GENT (Belgujo) ĉe Informoficejo: Halle-Belfort-Gent.

Pri SPA kaj la ALTAJ FANJOJ, ĉe la Informoficejo, 19 rue Sylvela, SPA (Belgujo)

Pri BRUGGE, artjuvelo de Belgujo, ĉe Urba Servo por Turismo, Dijver 16 BRUGGE (Belgujo).

De 9 - 16 Februaro ĉijare okazis en Recife la XIIIa Brazila Esperanto Kongreso. Vic-prezidanto de la kongreso estis pastro Francisco de Barros, rektoro de la Universitato.

Aliajn faldfoliojn eldonis la Urba Turistservo en BINGEN (Germanujo) pri la urbo, la pordego al la romantika parto de la Mez-Rejno.

La Turistservo de la Hansaurbo Hamburg k.c. (24a) HAMBURG 1, (Germanujo) eldonis belan faldprospekton pri la urbo.

La kongreslibro de la 37a Universala Kongreso en Oslo (2-8 Aŭgusto) enhavas la nomojn de 1250 partoprenantoj.

En siaj organoj UEA kaj SAT publikigas nefermitan leteron al J.V. Stalin en Moskvo, responde al ties artikoloj pri la internacia lingvo.

Ni scivolas ĉu s-ro Stalin donos respondon al la demando.


Ĝambrokantisto Carl Aŭgust Kohler, kiu kantis dum la 23a IKKE en München, je la 27a de Aprilo 1952 kantis en Esperanto en Radio Vatikana.

En diversaj lernejoj oni instruas Esperanton.

Ĉu ne estas eble, eĉ necese, ke la katolikaj instruistoj interkonatigas kun samcelantaj kolegoj eksterlandaj, por ke el ĝi kresku internacia kontakto de katolikaj lernantoj?.

\* \* \*

# RADIO PROGRAMA



## RADIO ROMA

- Julio 16 Fabelo 'La Amikinoj', originale verkita de s-ino Feigenbutz (Germanujo)  
Julio 18 Itala Literaturo: Luigi Pulci, (prof. Musella)  
Julio 23 Por geknaboj: Pinokjo, 7a sceno.  
Julio 25 La Kristaneco: Sankta Aŭgusteno. (Musella)  
Julio 30 Italaj urboj: Bergamo (Blasimme)  
Aŭgusto 1 Respondoj al la geaŭskultantoj. (Blasimme)  
Aŭgusto 6 Turismo: Revo kaj Verona (Blasimme)  
Aŭgusto 8 La Kristaneco: Sankta Benedikto (Musella)  
Aŭgusto 13 Italaj komponistoj: Monteverdi kaj la Venetia skolo, (Blasimme)  
Aŭgusto 15 Itala Literaturo: Matteo Maria Bojardo. (Musella)  
Aŭgusto 20 Hungaraj fabeloj, esperantigita de s-ro P. Balkanyi el Budapest.  
Aŭgusto 22 La Kristaneco: Sankta Gregoro la Granda. (Musella)  
Aŭgusto 27 Por geknaboj: Pinokjo, 8a sceno.  
Aŭgusto 29 Rekonstruado en Sicilio - au - Intervjuo pri la 37a Universala Kongreso de Esperanto.

Horoj: 19.00 - 19.20 (MET). Ondolongoj: 25,21m - 31.35m - 49.92 m.

Bonvolu raporti al RADIO ROMA - Esperanto Fako-Via Veneto 56-ROMA (Italujo)

Bonvolu noti ke la elsendoj de la Katolika Radio Stacio Hilversumo ek de la unua de Julio ĝis la 30-a de Septembro okazas je ondolongo 298 m. La elsendo en Esperanto estas ĉiun sabatvesperon je la 23.15 h. Bonvolu subteni ĉi tiun gravan elsendadon per via raporto al K.R.O. - HILVERSUM (Nederlando)



14 s-ro R. Lepeintre - Nantes (Francujo)

Niaj samkredanaj persekutantoj atendas vian helpon!  
Bonvolu sendi vian kontribuon por ĉi tiu kategorio.  
DANKON!



## KORESPONDADO

F-ino M.F.J. Zaat, Westeinde 89, VOORNURG (Nederlando) pianinstruistino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Ĉi tiu anonco validas ĉiam.  
s-ino E. Hendriks, Molenstraat 12, WEERT (Nederlando) kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

s-ro Anton Sched, Renatastraat 17 b/2, (13 b) MÜNCHEN (Germanujo) poŝtisto.

LA SUNKRONO estas bela verko de unu el la plej famaj katolikaj verkistinoj nederlandaj (trad. de V.D. Vijver). Prezo 1.25 ned, guldenoj, aŭ 6 int.Rkp. Mendu ĉe 'Espero Katolika' - Vleuten (Nederlando) aŭ ĉe niaj reprezentantoj.